

## Stipendioj anoncataj por instruista trejnado!

Ekde septembro 2013 denove okazos unu-jara instruista trejnado ofertata de la Universitato UAM (Adam Mickiewicz) en Poznano, Pollando, kunlabore kun ILEI, UEA kaj <edukado.net>. La aliĝa limdato por la kurso estas la **10a de aŭgusto**; la studjaro komenciĝos en la **14a de septembro** per unu-semajna ĉeesta kurso. Informoj pri la kurso troviĝas en nia hejmpaĝo <[www.ilei.info](http://www.ilei.info)>, ĉe <[edukado.net](http://edukado.net)> kaj estis dissendita tra niaj listoj kaj tiuj de UEA. Eblas viziti ankaŭ la esperantlingvan hejmpaĝon ĉe UAM: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

### ILEI kaj UEA kunlabore

ILEI (pli precize ĝia Fondaĵo Szerdahelyi) kaj UEA konsentis kontribui po 520 eŭrojn por faciligi la partoprenon de kvar kursanoj. Ili faras tion ĉar la instruista trejnado figuras alte en la prioritatoj de ambaŭ organizoj.

### La oferto:

ILEI kaj UEA ofertas **kvar** stipendiojn je valoro de **260 eŭroj jare (do €130 semestre)**, por mildigi la kursokostojn. Tio pli-malpli kovros la kurskoston por B-landano kaj 42% por A-landano. Restas al la kursano kovri la surlokajn kaj vojaĝajn kostojn por la du ĉeestaj sesioj en septembro 2013 kaj februaro 2014 kaj la kurs-fina ekzamenado. La cetera kurso okazas distance, per reta korespondado kaj rete liverendaj taskoj.

Kondiĉoj kandidatiĝi por la stipendioj estas plenskribi normalan kurs-aliĝilon trovebla en la retejo donita supre, kaj krome skribi duon- ĝis unu-paĝan kandidatigan tekston kun tri eroj:

- 1) Motivoj por deziri partopreni la kurson
- 2) Biografieto pri ĝisnunaj profesiaj kaj esperantistaj agadoj
- 3) Intencoj plenumi instruistan laboron kaj gvidi kursojn rezulte de la partopreno.

Tiun tekston oni sendu rete al Iлона Koutny por UAM (kurs-direktoro) <[koutny.ilona@gmail.com](mailto:koutny.ilona@gmail.com)>, Katalin Kovats (kurs-gvidanto) <[katalin.kovats@gmail.com](mailto:katalin.kovats@gmail.com)>, Zsófia Kóródy por ILEI <[zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de)> kaj Claude Nourmont por UEA <[moonmont@pt.lu](mailto:moonmont@pt.lu)> kiel eble plej baldaŭ, ĝis maksimume la **10a de julio**. Tiuj formos grupon kiu prijuĝos la petojn kaj anoncos la rezultojn kadre de la 46a Konferenco de ILEI (12-18 julio). Kaze de fizike skribita peto, sendu al Zsófia Kóródy, ICH, Grubenhagenstr 6, DE-37412 Herzberg-Harz, Germanio.

La stipendiaj sumoj estas disponigitaj surloke. Kandidatigo por stipendio estas malferma al ĉiu kiu plenumas la enirkondiĉojn de la kurso, sed ni donos prioritaton al B-landanoj, tiuj sub 35-jaraj, kaj tiuj kiuj plej konvinke skizas kiel ili planas instrui Esperanton dum aŭ post la kurso, pere de la lertoj tie akiritaj.

Pliaj informoj ekzistas pri la kurso kaj la atingeblo de Poznan (pluraj rabat-flugkompanioj servas la urbon, haveblas rabatbiletoj ĉe fervojoj), kaj la moderprezaj ebloj por tranoktado.

Ni ĝojos, se iuj Landaj Asocioj de UEA aŭ Landaj Sekcioj de ILEI pretas aldone oferti proprajn stipendiojn por loĝantoj de siaj landoj, ĉar la projekto de UEA-ILEI certe ne kovros ĉies deziron. Estas ja en iliaj interesoj altigi la kvaliton de la enlanda instruado.

